

De la 25a de Majo ĝis la 3a de Junio

Esperanto-vojaĝo en Nederlando

Initiée par un petit oculiste né aux confins de territoires morcelés et fondamentalement sources de disputes, la langue internationale Esperanto a été créée comme réponse à cette animosité.

La langue et sa culture ne vivent désormais que par nous, ses locuteurs. Nous seuls, électrons libres de la pensée linguistique internationale avons le pouvoir et devoir de la maintenir vivace et de la pérenniser.

Il n'y a pas mieux pour la faire vivre que de partager avec des *samedanoj* – mais pas seulement avec eux – les expériences vécues, et ainsi transformer, ce qui aurait pu paraître comme un simple voyage entre amis, en un événement dont la portée va bien au-delà de la simplicité puisque porteuse d'idéal. Maintenant, imaginez seulement que sans l'Esperanto... rien de cela... ne se serait passé...

Iniciatita de eta okul-kuracisto, naskiĝinta en la kruciĝo de landoj dispartigitaj kaj fundamente kverel-fontaj, la Internacia Lingvo Esperanto estis kreita kiel rebato al tiu inciteco.

La lingvo kaj ties kulturo nun nur vivas tra ni, siaj geparolantoj. Nur ni, liberaj elektronoj pri internacia lingvistiko-penso, havas la potencon kaj la devon plu konservi ĝin vivanta kaj ĉiam-ec-igi ĝin. Ne ekzistas solvo pli bona por vivi ĝin ol diskonigo al ĉiuj samideanoj – sed ne nur al ili – pri la travivitaj spertoj; kaj tiele transformi tion, kio povus nur aspekti kiel simpla vojaĝo inter geamikoj, en eventon, kies graveco transiras simplecon, ĉar ĝi vehiklas idealon.

Nur imagu nun, ke sen Esperanto... nenio el tiu ĉi rakonto... estus okazinta...

«En Majo, ni vizitis Nederlandon, Bernadette, Daniel mia edzo kaj mi Maryse»

«(Niaj nederlandaj geamikoj) vizitigis al ni siajn regionojn: Almeno, Kampen, Nijmegen...»

Vojaĝ-libreto de Daniel Devis



Vojaĝ-libreto de Bernadette Manier

Daniel projektis kontakti esperantistajn asociojn en eksterlando por renkonti diversajn grupojn kaj praktiki la lingvon. Tiu projekto ŝajnis al mi tre interesa. Do ni decidis pripensi por realigi ĝin.

- Nederlando estis elektita.
- Ni vojaĝos (Daniel, Maryse kaj mi) per loĝaŭto.
- Ni preparos dokumentojn por prezenti nian regionon al geamikoj.

La preparlaboroj estis disdonitaj kaj Daniel komencis la ret-kontaktojn. Ni decidis prepari diapozitivojn pri la urbo Amieno (apud kie oni loĝas) kaj kasedon pri la pikarda marbordo.

Iu pruntedonis al ni kelkajn diapozitivojn; Maryse kaj mi fotis tiujn, kiuj mankis por bone ilustru niajn prelegojn pri Amieno kaj la katedralo.

Maryse sukcesis el la Regiona Konsilio obteni kasedon pri la pikarda marbordo (filmo de F. Maillart). Dum unu vespero, mi aŭskultis kaj transskribis la francan komenton.

Dum 2 vesperoj, ni esperante tradukis la francan komenton.

Du asocioj pruntedonis al ni la necesan materialon, kaj per la helpo de mia filo ni sukcesis legante la preparitan tekston, meti la esperantistan komenton sur la francan filmon gardante la originalan muzikon. Tio ne estis facila. Plie, tiu afero devis esti farita tre



Merkredo la 25an de Majo:

Esperanto sonas en Eŭropa Komisiono!

La unua antaŭvidita rendevuo de nia turneo estis en Nijmegen. Do ni estis volanta etapi antaŭ iri tien. Unu korespondanto el Maastricht respondis nur unu vorton: eblus, kaj poste silentis. La grupo de Bruselo ne respondis. Fine S-ro Delforge el Charleroi proponis al ni partopreni en kunveno kun la grupo de... Bruselo! en la lokalo de la Eŭropa Komisiono.

Ni havis rendevuon je la dekoka. Dek kilometroj antaŭ Bruselo estis la deksepa. Ni alvenis al la rendevuo je la deknaŭa. Kial do? Bruselo havas teruran trafikon je tiuj horoj! Nenio estas diri tion, sed ni vivis tion! Kaj malfeliĉaj homoj ĉiutage vivas tion! La loĝaŭto, kiel la aliaj antaŭeniris nur paŝe: kelkfoje tute ne antaŭis. Mi ne priskribos al vi la grandegan ĝojon de Manjo! Alia sporto estis trovi la ĝustan straton sen mapo: malgrimpi el la loĝaŭto, kuri malantaŭ bruselano, demandi, regrimp, ĉio en torenta trafiko estas bona por la sano!

Fine ni eniris en la lokalon de la Eŭropa Komisiono. Kia lukso lokalo! Vasta halo el mikse rozkolora kaj nigra marmoro, grandaj ŝtuparoj, salonoj kun komfortaj brakseĝoj... Nenio estas tro bela per niaj impostoj!

Kaj neniu eniras kiel li volas en tiu ŝirmo de la eŭropa povo. Feliĉe ke ni estis atenditaj. Por eniri vi devas esti antaŭvidita, vi devas doni vian nomon, adreson, prezenti vian identecan karton. La horo de via eniro estas enregistrita. Vi ricevas badĝon kaj via gastiganto devas preni vin je la enirejo.

Deko da personoj el la brusela grupo estis ĉi tie. Almenaŭ kvar el ili mi jam vidis en Morbeck en la grupo de la spertuloj. La prezidanto prelegis pri S-ro De Zilha kiu verkis librojn kaj subtenas kun sia familio la revuon **Gazeto** kiu temas pri kulturaj aferoj. La prezidanto, kiun Manjo kaj Bernadeta ne ĉiam komprenis, estis entouziasma pri sia temo kaj enviigis legi tiun aŭtoron. Jen, en angulo de la prelego, naskiĝis diskuton pri Ivan Lapena. Kelkaj el la grupo vivis je lia epoko kaj ĉiuj diris ke li faris multe por la movado, ke li permesis la rezolucion de Montevideo pri Esperanto, sed ke li estis diktatorema, kaj tre malbone vivis kiam li ne estis reelektita prezidanto de UEA. Li provis krei alian asocion kontraŭ UEA, sen sukceso. Jen parto de nia historio.

Fine unu el la membro de la grupo gvidas nin al tute agrabla tendejo kaj irante, klarigis al ni ke la prezidanto kaj unu alia membro de la grupo estas greko kaj portugalo kaj laboras kiel tradukistoj en la Eŭropa Komisiono, ili estis eksmatematikistoj kaj estis tolerataj por fari esperantaj kunvenoj en tiu lokalo. Irante, li montris al ni, multajn belajn monumentoj de Bruselo kaj ni povis aprezi la belecon de tiu ĉi parto de la urbo vere dronigita en verduraĵoj.

Jaŭdo 26an de Majo: Mirinda Originalulo!

Pietro atendis nin je la dekkvara. Ni alvenis je la dekkvina kaj tri kvaronoj, post la emocio scii ĉu ni bone trovus lian adreson. Fakte ni pasis dufoje antaŭ la enirejo de la ferivilaĝo kie li loĝas konstante. Kiel priskribi lin? Hirta viro, la okulo rigardanta kun lumo de bonfaremo, la malofta hararo turniĝanta al la ĉielo, la ĉemizo duone eliranta el la pantalono, ĝi mem ne estante horizontala je la zono (kia zono? eĉ estas?) kaj ĉifita aŭ

**«Mia unua impresio pri
Nederlando estis la pureco
kaj la ebenaĵo»**

rapide ĉar la dato de la foriro alproksimiĝis. La rezultado ne estis perfekta sed tute korekta se oni konsideras la urĝajn kondiĉojn de tiu laboro.

Ni opiniis ke tiu filmo kaj tiuj diapozitivaj plifaciligus la ekkomunikadon dum niaj renkontoj en Nederlando.

Kaj venis la forirotago: 25an de Majo 2005



La vetero estis bela. Unua rendevuo: la Eŭropa Komisiono en Bruselo (sur-priza loko!). Ni veturis ĝis Bruselo sen problemo sed por atingi la rendevuolokon kie okazis la renkonto, ni perdis nin dum 2 horoj en la trafikŝtopado.

De tiu ĉi momento oni vivis ne kutiman sperton: eniri en la Eŭropan Komisiononon.

Ni devis prezenti niajn identit-kartojn kaj subskribi sur papero, la enirhoron. Oficisto donis al ni insignon rajtigante nin cirkuli en la komisionlokoj. Alia oficisto kondukis nin ĉe la esperanta grupo en komforta salono kie belga amiko de Daniel prezentis nin al grupo. Oni alportis al ni tre bongustajn trinkaĵojn.

Du personoj el la grupo laboris kiel tradukistoj en la komisiono kaj pro tio, ili rajtis kunveni ĉi tie.

Unu el ili estis ruso, la alia portugalo. La grupo kunigas personojn el multaj nacioj kiuj vivas en Bruselo, internacia urbo.

La ruso saĝas esti la estro de la grupo. Tiun ĉi tagon, li prezentis «Eugene de Silha» fama verkisto kaj kreinto de la ĵurnalo «la Gazetto».

La etoso de la kunveno estis tre speciala. Nur 3 personoj partoprenis. La aliaj tute ne parolis kaj preskaŭ ĉiuj foriris antaŭ la fino de la konveno (strange!!).

Poste, simpatia viro, vizitigis al ni kvartalon de Bruselo speciale la pordon de Belgio, nova konstruado solenanta la 50 datrevenon de la kreado de Belgio; kaj li gvidis nin ĝis la tendejo.

Jaŭdo 26an de Majo, la vetero ankoraŭ estas bela eĉ varmega.

Dum la postagmezo, ni alvenis en la domo de Peter apud Nimègues. Li loĝas en libertempa centro apud la kampoj.

Li tre agrable akceptis nin per bonaj malvarmegaj trinkaĵoj.

Peter estas tre ĉarma, malstreĉa kaj la interparolo estis tre facila.

Li donis al ni la programon de la tagmezo kaj de la vespero.

Unue, li invitis nin bicikle promeni dum li preparus la manĝaĵojn.

malstreĉita aŭ la du, mi ne scias diri, sed, kia varma akcepto! La domo estas tute invadita de milionoj da diversaj objektoj restantaj tie kaj tie ĉi, en la lasta misordo. Ne gravas. Li invitis nin kaj kelkaj geamikoj manĝi vespere. Li kuiris la tutan posttagmezon por ni, vestita de virga blanka profesia antaŭtuko. Kion ni manĝis? Vi volas scii, ĉu ne? Poreojn, poreojn kaj poreojn. Jes ja! Ni manĝis supon kun elirbazo el algoj kaj krudaj poreoj kaj fenkoloj. Poste Pietro alportis du tortoj kun poreoj kaj fromaĝoj. Ili estas lia specialaĵo. En deserto ni havis sojkremon kaj fragojn de lia najbarino. Post la manĝo, novaj amikoj alvenis kaj ni estis dek du por rigardi la videobendon kaj la lumbildojn kiujn ni alportis pri nia regiono.



Ni dormis en la loĝaŭto artiste parkita de Bernadeta antaŭ la domo de Pietro.

Morgaŭe ni matenmanĝis kun li kaj iomete malkovris lian vivon. Li vivis dekseksjarojn en Parizo, li vivis dum 10 el tiuj jaroj kun vaska hispanino, li faris geston kiu ŝajnis signifi ke tio estis moviganta! Iomete petadante, li fine aŭdacis paroli la francan, kiun li tute flue parolas, malgraŭ ke li diris la malon.

Jen estas Pietro kaj ni bone kredas kaj esperas, ke ni okaze vidos lin en Amiens.



Vendredo la 27an de Majo: S-ino Derks aŭ S-ro Derks? Almelo aŭ Kampen?

Ni vekis Bernadeta pli frue ol antaŭvidita. Estas io, kion oni ne devas fari, ĉu ne?

Ni matenmanĝis kun Pietro. La vetero estis tiel dolĉa kiel ni matenmanĝis ekstere antaŭ liaj basenoj, ĉarmitaj de la blekado de la virranoj kiuj havis ideojn.

Je la naŭa venis la Prezidanto de la grupo de Nijmehen kiu ĉiĉeronis nin tra la urbo. Agrabla promonado tra la sola nederlanda urbo konstruita sur montetoj. Ni vidis la domo kie Karl Marx, knabo, vivis kaj malsupreniris al la rivero kaj ni vidis kiel la nijmehenanoj nepenetrebilis la prokektilojn kontraŭ la inundoj per ĉevalfekajoj.



Oni rakontis al ni tradiciajn legendojn, kiel en ĉiu urbo pri tiu aŭ tiu ĉi statuo. Sur la brako de la rivero kiu preterpasas Nijmehen, estas la plej intensa ŝiptrafiko el la mondo inter la Rhur regiono kaj la marhavenoj. La nijmehenanoj inventis sistemon por ke la fluo puŝu plurajn ŝipojn ligitajn inter si per granda stango por ke la fino iru al la alia flanko de la rivero por fari ponton. La rivero estas ĉirkaŭ unu-kilometro larĝa.

Nia ĉiĉerono enigis nin en sian domon por saluti sian edzinon kaj por montri al ni ŝian eksterordinaran ĝardenon!!! Ni eniris en

Kiam ni reiris post la promonado, 4 amikoj de Peter helpis al li instali la tablon en la ĝardenon.

Peter surhavas grandan antaŭtukon kaj kuiris diversajn aferojn. Tre bona kaj simpatika etoso.

Post la aperitivo, ni manĝis poreo-supon, poreo-torton kaj poreo-fromaĝo-torton. Ĉiuj ĉi manĝaĵoj estis tre bongustaj sed tio estis tre miriga menuo. Eble estas kutume prepari manĝaĵo pri temo kiel por ekzemplo: la poreoj. La amikoj de Peter ne sajnus suprizitaj; Ni ne kuraĝis demandi do ni ne scias.

Post la manĝaĵo alvenis aliaj geamikoj. Ili instaligis kaj ni komencis la prelegojn; Daniel pri Amieno kaj mi pri la katedralo.



Kompreneble, Daniel facile kaj flue parolis. Mi avertis ĉiujn pri mia malfacila parolado. Tamen, tial ke, ili ĉiuj estis tre simpatiaj, mi decidis komenti sen legi miajn paperojn. Ne estis tro malbone kaj ili ŝajnis tute kompreni (eble ili estis nur tre ĝentilaj!). Sed subite mi ne plu povis paroli. Denove la vortoj estis blokita.

Do mi finis la prelegon legante. Tamen mi estis kontenta esti aŭdacinta kaj mi sentis ke la esperantisto-malblokado komenciĝis.

La prezidanto de la grupo (bedaŭrinde mi ne plu memoras lian nomon) donacis al ĉiu el ni belan kuleron de sia urbo Nimego.

La vespero estis tre agrabla.

Ni adiaŭis ĉiujn. La amikoj foriris kaj la prezidanto diris al ni, ke morgaŭ li venos preni nin por viziti la urbon.

Ni helpis Peter ordigi la kuirejon kaj ni reiris al la loĝaŭto por tranokti.

Vendredo 27an de Majo

Ni matenmaĝis en la ĝardeno kun Peter. La etoso ĉiam estis tre bona. Nur de tio momento, Peter konfesis al ni ke li bone parolis la francan ĉar li vivis dum 12 jaroj en Parizo kun kunulino. Li elektis ne diri tion por ke ĉiuj el ni esperante parolu. Mi opinias, ke li pravis.

Peter akompanis nin ĝis la aliro de la vilaĝo. La prezidanto atendis nin kaj li veturigis nin ĝis Nimègues kaj vizitigis al ni la urbon. Poste ni haltis en lia domo. Li prezentis al ni sian edzinon, kiu prizorgis sian ĝardenon per grava pasio. La rezulto de ŝia laboro estis belega kaj bonodoranta loko plena de floroj de arboj kaj de akvobasenoj.

Ni dankis kaj adiaŭis ilin, kaj ni foriris al aliaj aventuroj.



apartan mondon, tute paca, en superkreskanta vegetalaro kun mirindaj, buntaj, bonflaraj floroj, kun tri aŭ kvar basenetoj en kiuj nufaroj sin ĝojkreskas kaj birdoj sin banas. Li diris al ni ke lia edzino laboras en sia ĝardeno tage kaj nokte! Kaj oni kredas lin! Pro la nekredebla verdetoso en kiu ni havis la privilegion spiri.

Post la adiaŭoj al ili kaj al Pietro ni iris norden al Almelo. La vojaĝo ŝajnis al ni multe pli longa ol antaŭvidita ĉar, ne dezirante uzi la aŭtvojojn ni ne povis veturi rapide.

Alveninte al Almelo ni elirigis el la sako mapojn, kiujn sendis al ni S-ino Dercks. Je la enirejo de la urbo, ni serĉis por trovi la rilatojn inter la mapo de la urbo kaj la nia. Nenio. Absolute neniu rilato! Post intensa cerbumado, intensa serĉado, ni decidiĝis aŭdaci peti helpo de iu paro sur trotuaro. Angla peto, franca respondo! Nia mapo ne estis tiu de Almelo, sed tiu de Kampen?! 77 kilometrojn pli okcidente! Do ni eliris la jarlibron el la sako, ĉu ne? Kaj montris la adreson kaj la viro al ni desegnis mapon, kiu pli malfrue, sin verifiis perfekte ĝusta! Do, fine, ni alvenis ĉe S-ino Dercks je la sesa almenaŭ la dekkvara kaj duono. S-ino Dercks diris al ni ke ŝi ne sendis mapon al ni, ke ŝi scias ke ni devus veni, sed ne scias kiam, post ĉiuj mesaĝoj, kiujn ni interŝanĝis!!!? Kaj plu parolante, ni malkovris ke ankoraŭ estas delegito nomata S-ro Derks en Kampen! S-ino Dercks telefonis al S-ro Derks kiu atendas nin por vespermanĝi!! Manĝo preskaŭ svenis pro manko da aero kaj pro lacego de sia kolo. Post kelkaj minutoj da parolado, ni interkonsentis iri en Kampen Dimanĉo la 29an posttagmeze.

S-ino Dercks kiu suferas pro sia ŝultro enkondukis nin en kampadejon konatan de ŝi. Ni rekondukis ŝin hejmen. Ni reiris al la kampadejo kie, fine, ni instaligis. Bonan nokton!!!

Maryse, Gerda kaj Bernadette fotitaj de Danielo.



Sabato la 28an de Majo: Ĉu Nederlando tropika lando?

Tuj post la ellitiĝo la temperaturo estis 24 gradoj! La suno tute ridas kaj Bernadeta elirigis la sunombrelo por matenmanĝi! Je la deka ni estis alvenanta, kiel konsentite, per bicikloj ĉe S-ino Dercks. Ŝi sukcesis organizi aranĝojn: amikino de ŝi ĉiĉeronos nin bicikle ĝis la dekseka.

Paro de ŝi venos vespere por vidi la videobendon kaj la bildlumojn.

Do, Ingue, ĉiĉeronis nin bicikle tra la mirinda kamparo ĉirkaŭ Almelo. Ŝi estis ege ĉarma damo vestita kiel por la urbo kaj biciklante kaj babilante kun, tiam kaj tiam ĉi, kelkaj simpatiaj ekridoj. Ni do spertis la nederlandan meztagmanĝon el kelkaj panoj, kun kolbaso kaj ananaso kaj fromaĝo, *fricando*, speciala sukerigita pano pri kiu Ingue rakontis, ke oni donacas al novaj gepatroj la saman pezon de tiu pano ol la pezo de ilia ĝisnaskita infano.

Vespere ni nin retrovis ĉe S-ino Dercks kun internacia paro: ŝi estas polino kaj li estas nederlandano. Ŝi estis tre amfaze babilema kaj simpatia. Ni kune aŭskultis radio Varsovio esperante. Ni tri ne multe komprenis pro la rapideco de la parolado. Estis intervjuo de la Prezidanto de la litova movado, kiun ni vidis en Bulonjo-ĉe-maro,

«La bona akcepto, la disponebleco de niaj geamikoj»



Danielo kaj Maryse havantaj la prelegion spiri la verdetoson...

Ni alvenis en Almenon por renkonti Gerdan. Daniel havis mapon de la Kvartalo de Gerda. Fakte, tiu mapo ne konformiĝis al la mapo de la urbo. Strange!

Komprenoble ni demandis preterpasantojn pri tio kaj iu klarigis la aferon: nia mapo ne estis tiu de Almeno sed tiu de alia urbo, kiun li konis. Tiu urbo kuŝas je 80 kilometroj. Pli kaj pli strange!

Tamen li indikis al ni la adreson de Gerda. Ni iris kaj trankiligis nin kiam oni vidis sur ŝia letterskatolo subskribiton ESPERANTO. Certe estis la bona domo.

Gerda, afable akceptis nin sed ŝi estis tre surprizita vidi nin ĉar ŝi ne atendis nin. Fakte, ŝi devus recevi nin sed ŝi avertis nin ke pro akcidento ŝi ne plu povis. Efektive, ŝia brako ankoraŭ doloris ŝin kaj ŝi ne plu povis uzi ĝin.

Daniel sciis tion; nenion plu li komprenis. Pli kaj pli strange! Sed tre rapide, Gerda divenis kio okazis. Certe, estis konfuzo pri la familia nomo, ĉar ekzistas alia esperantisto, Johano, kiu havas la similan familian nomon, sed kiu loĝas en alia urbo: Kampeno. Tia konfuzo jam okazis.

Do, Gerda efike, finaranĝis la problemon. Unue, ŝi telefonis al Johano. Jes, Johano kaj lia edzino atendis nin por vespermanĝi. Kion fari? Estis tro malfrue por iri ĝis Kampeno. Do ili decidis akcepti nin la sekvantan dimanĉon.

Dua problemo: la loĝaŭto. Ĝi ne povus parkadi en tiu strato dum la nokto; do Gerda kondukis nin en proksiman tendejon kie ŝi tute glatigis la detalojn de nia bona instalado. Poste ni rekondukis Gerdan al ŝia domo. Kiam nokte ni ekiris, estis decidita la programo de la morgaŭa tago: ŝi vizitigos al ni la urbon kaj ni invitos ŝin al restoracio.

Sabato 28an de Majo

La vetero estis ĉiam bela kaj varma.

Biciklante ni alvenis ĉe Gerda. Ŝi estis ŝanĝinta la programon. Ŝia amikino Inge estis tie ĉi, atendante nin. Ĉar ŝia brako handikapis ŝin, Gerda opiniis, ke estus pli bone por ni bicikle promeni kun Inge dum la tuta tago.

Do Inge elkondukis nin tra la proksima regiono. Biciklante, ni multe interparolis pri diversaj temoj: la eŭropa konstitucio, la nederlandaj lingvoj, la formado de la polderoj, la biciklrafiko... Tre agrabla tago.



Je la vespero, ni reiris ĉe Gerdan kiu intertempe estis invitinta esperantistan paron: ŝi estas polino kaj li nederlandano.

Kune, ni babilis kaj aŭskultis esperantan polan radion (tage, Gerda aŭskultis ĉi tiun radion elsendon).

«Ni povis bicikli tute facile, ĉar ni kunportis niajn biciklojn. (...) Per bicikloj ni vizitis Almenon kun nederlandanino tra la arbaro, la kamparo»

«Ni renkontis diversajn samideanojn, ĉiuj pli simpatiaj la unuaj ol la aliaj.»

kaj, kiel tie, ni ne sukcesis kompreni lin. Estas multe scivolema kiel kelkaj voĉoj el iuj kiuj bone parolas povas esti malfacile komprenebla kiam aliaj estas mirinde atingeblaj.

Bedaŭrinde, S-ino Dercks ne sukcesis funkciigi la videobendon sur sia televidaparato, sed ŝi multe aprezis la bidlumojn, ĉefe tiuj pri la katedralo pri kiu ŝi legis franglingve la librojn kiujn Bernadeta disponigis al ŝi dum la tago.

Dimanĉo la 29an de Majo: Parcelaro en la profunda Nederlando

Almelo–Kampen: 57 kilometroj tute trankvilaj. Ni reelirigis la mapon por trovi nian korespondanton: S-ro Derks. Sed ni ne sukcesis nin situi sur tiu ĉi mapo. Do, fine, denove, ni petis helpojn al du motorciklistoj. Bedaŭrinde, por tia ekzerco la angla pli valoras ol la esperanta, kaj, denove, ni trovis helpemajn personojn. Ili antaŭis nin ĝis la bona strato en vera labirinto de parcelaroj el malgrandaj domoj el brikoj kun mallargaj parkejo antaŭe kaj mallarga ĝardeno malantaŭe. La parcelaroj estas dividitaj per kanaletoj, kaj eĉ la stratoj estas el brikoj. Tio donas, laŭ mi, malgaja kaj iomete prema etoso. Kiam ni estis en la bona strato la motorciklistoj salutis nin kaj malkovrigis. Tiam, paro da nederlandanoj helpis nin trovi la bonan domon kiun ni serĉis je la 12 kaj kiu estis je la 40!

Fine, malfermis al ni S-ro Johan Derks. Ni estis atendita je la 14a, ni alvenis je la 15a. Nova internacia paro: ŝi estas serbino, li estas nederlandano. Ili geedziĝis en Marto 2005 kaj renkontiĝis en Hungario. Ni multe babilis kaj Johan plibone prononciis Manjon kaj Bernadetan. Eble li ne aŭdacis la saman al mi...

Post momento, kelkaj vortoj el la konversacio dubigis nin ke ili atendis nin por la tagmanĝo. Fine ni komencis la vespermanĝon ĉirkaŭ la 16an kaj duono. La manĝo estis ege bona kaj daŭris longe pro babilego. Bernadeta liberigis sian paroladon, rajtante unu el siaj batalĉevaloj: egaleco inter viroj kaj virinoj, kaj ŝi sukcesis delogi Johan en la paradizo de la ĝuste dispartigita vivo. Scivolema etoso inter la membroj de tiu paro; inter la emo al la serba kulturo kiu faras ke ŝi plezure kuiras por montri sian ĝojon nin akcepti kaj la emo al la protestanta kulturo kie la tuto devas esti en ordo kaj ĉio al sia bona loko. Eĉ ni dubis ke ŝi manĝis kun ni! Ke ŝi table servu nin kaj ne manĝis kun ni! Je nia alveno la tablo estis pretigita por kvar kaj ĝuste antaŭ manĝi ŝi kunportis sian teleraron, kaj ŝi sidigis sur la pianseĝo, ne je la bona alteco. Nur duone de la manĝado, ŝi ŝanĝis por preni taŭgan seĝon. Kaj ŝi klarigis al ni ke ŝia patrino kutime ne partoprenis al la manĝado kun la gastoj; ŝi restadis staranta malantaŭe. Manjo aparte babilis kun Svetlana parolante pri kuirado.

Post la manĝado ni prezentis la bidlumojn kaj tranoktis en la loĝaŭto sur la parkejo antaŭ la domo de la gesinjoroj Derks. Ni ne revidis Svetlana, ĉar, kiel nova nederlandanino ŝi devas lerni la nacian lingvon kaj regule fari radioskopiojn tiun ĉi matenon.

Lundo la 30an de Majo: Tamen iomete da pluvo en Nederlando

Matene Johano indikis al ni la vojon por iri al Giethorn, surlaga vilaĝeto, en kiu ni promenis per elektra barko. Ĝi estis tre bela sed la nuboj montris al ni siajn nigrajn facetojn, tio kio fuŝis nian plezuron. Tuj post la tagmanĝo pluvis kaj ni siestis antaŭ ol bicikli.

Sub malsekiganta pluveto ni vizitis Straphorst, vilaĝo kie vivas severe tradicia protestanta komunumo, kie la virinoj estis ankaŭ vestitaj per tute nigra tradicia vestaro, kie la domoj de la farmbienoj estas malaltaj longaj kaj kovritaj per pajlotegmento.

Vespere ni instaliĝis en mirinde bela kampadejo apud Wassen, ĉarma urbeto kie ni promenis sub fina pluvo kaj kie la virinoj sin ekzercis kompari la prezojn. Konkludo: la prezoj pri la nutraĵoj estas pli malpli la samaj kiel ĉe ni. La prezoj pri la vestoj estas pli altaj kaj la prezoj pri la domnegoco estas la trioblo aŭ la kvaroblo de la niaj.

La geamikoj ne longtempe restis ĉar ili ĵus revenis el Pollando kaj ili estis tre lacaj.

Ni ne povis rigardi la videobandon ĉar Gerda ne sukcesis funkciigi la televidilon. Sed ni komentis la diapozitivojn. Gerda bone konas Francion.

Poste ni adiaŭis forlansante Gerdan en ŝia bela apartamento en la centro de Almeno. Estis bela renkontiĝo kaj bela akcepto precipe kiam oni scias, ke ŝi ne atendis nin.

Dimanĉo 29an de Majo

Ni ekiris al Kampeno kie Johano kaj lia edzino atendis nin. Malgraŭ la mapo (la bona mapo tiu ĉi foje) ne estis facile trovi. Kiel kutime, oni demandis iun. Du motoristoj konis la lokon sed pensis, ke klarigi estus malfacile do ili decidis konduki nin. Ili antaŭiris la loĝaŭton, kvazaŭ ĝi estus grava oficiala veturilo.



Ni alvenis je la 15a. Johano kaj lia edzino Sveltana akceptis nin en la ĝardeno. Johano estas emerito (li estis matematik-instruisto). Smeltana estas serba virino.

Ili geedziĝis antaŭ 4 monatoj. Ili renkontiĝis dum esperanta kongreso. (Ankoraŭ esperantista paro!). Sveltana multe parolis pri sia nova vivo en Nederlando. Kiel nova enmigranto, ŝi estas devigata sekvi nederlandlingvokursojn kaj pasigi sankontrolojn.

Sed ĉefe ŝi parolis pri sia antaŭa vivo en Serbio, pri sia unua edzo, kaj pri la gravaj problemoj pri tabako kaj alkoholo en la lando.

Ŝi rakontis al ni sian grandegan plezuron kiam Johano kondukis ŝin en Parizon (tio estis ŝia ĉiama sonĝo).

Ŝi ankoraŭ multe parolis kun Maryse pri la receptoj.

Ni ankaŭ interparolis pri la rajtoj de la virinoj tra la mondo (tre interesa interparolo).

Je la 20a, Johano ŝaltis la televidilon TV5 por scii la rezultadojn de la referendumo en Francio kaj kompreneble, oni ankoraŭ multe parolis pri la eŭropa konstitucio.

Mia parolo iĝis pli kaj pli flua; certe ne perfekta sed sufiĉa por komprenigi min.

La vespero finiĝis kaj ni iris por dormi en la loĝaŭton.

«Ha! Ĉefe, mi forgesis: niaj geamikoj preparis por ni bongustan manĝaĵon.»

Lundo 30an de Majo

Johano devis akompani nin por viziti sed lia horplano ne permesis al li tion. Per reto li preparis kaj esperante tradukis ĉirkaŭiron.

Ni alvenis en Gietvorno «la malgranda Venizo». Per elektra boato, ni promenis sur akvo en tiu bela kaj kvietra loko.

Posttagmeze, ni devis bicikle promeni sed pluvis, do ni siestis, ripozis, skribis poŝkartojn, legis... kaj ni pasigis la nokton en tendejo.



Mardo la 31an de Majo: Ripozo kaj Naturkampadejo

Matene ni restis en la kampadejo alternative enirante kaj elirante la tablon kaj la seĝojn pro pluvo kaj suno. Ni malfrue dormis kaj reprenis la malfruon de niaj vojaĝlibretojn. Posttagmeze ni vizitis en Apeldoorn S-ino Shoulten kiu akceptis nin ĉe si kun unu el siaj esperantistaj amikoj. Post la bonvenan babiladon, trinkante teon kaj manĝante kukojn (rafinmaniere kiel en Anglio), ni prezentis la lumbildojn kaj la videobendon. Tiu ĉi lasta multe plaĉis, ĉar ili diris ke, ofte, S-ro Shoulten aranĝas vojaĝon en la nordaj insuloj de Nederlando, kaj, ke la pejzaĝoj de tiuj insuloj multe similas al la pejzaĝoj de nia regiono.

Poste, serĉante kampadejon, ni fine alvenis al mirinda naturkampadejo. Meze de arbaro, vasta spaco engazonita, kie estas disponeblaj elektro, akvo, loko kun tre puraj necesoj kaj varmaj duŝoj. Neniu por pagi! Anglingve la najbaroj indikis al ni hipotezan piedirantan vojeton, neuzeblan per loĝaŭto por iri pagi ie ajn. Ni instaligis kaj ĝuis la lokon.

Merkredo la 1an de Junio: Jen! La Centra Oficejo!

La vojaĝo al Schiedam estis pli facila kaj rapida ol ni autaŭvidis, do ni decidis iomete viziti Goudan. La centro de Gouda estas ĉirkaŭita de 3 aŭ 4 cirkloj da kanaloj kiuj pensigas al mi pri Sète. La urbo estas maljuna, pavimita, kun verdaj kaj belaj konstruaĵoj. Ni vizitis la Katedralon kiu entenas tute belajn vitraĵojn kiuj, nur pro ili, meritas venon kaj viziton. La enirejo de la Katedralo estas en tre ridanta kaj tre agrabla strato, tute freŝaj sub la arboj, preter eta kanaleteto. La ĉefa komerca strato estas piediranta, kaj, ĉi tiun tagon, sur la centra placo estis «subtegmentmalplenigo». La etoso estis tre simpatia. Estis granda plezuro gapvagi tie sub la suno. Manĝo trovis ĉi tie sian feliĉon: du fajencajn pavimerojn el Delft, absolute ne multekostajn por uzi ilin kiel subpladoj. Post la gapvagon, je la granda surprizo de Bernadette, mi instalis nin surponte kaj manĝis ĉe la kanalo. Policanino, ĉi tie pasanta, toleris, ke la loĝaŭto parkis sur la apuda strato, nur duonhoron.

Ni alvenis rekte ĉe S-ro Breems laŭ lia mapo. Li loĝas en apartamento je la 5a etaĝo en la norda parto de Schieman, urbo de la ĉirkaŭaĵo de Roterdamo. Ni babilis kaj manĝis je la 17a antaŭ iri al la kunveno. Ni translokiĝis la biciklojn en lia kelo, ĉar nia bicikloj estas tiaj ke ili estus taŭgaj por allogi iujn ajn ŝtelistojn. La subteretaĝa de tiu bloko estas tre zorgeme farbita kaj tre pura. Ĝi estas ankaŭ bone sekurigita.

En tramo kaj en subtera-fervojo kun s-ro Breems



Ni prenis tramon kaj subteran fervojon por iri al la Centra Oficejo de UEA. Ni ne povis viziti ĝin ĉar ne estas malfermotago kaj je tia horo ne plu estis laboristoj. Ni nur vidis la subtera etaĝo kie ni

Mardo 31an de Majo

Tiun ĉi tagon, en Aperldorn, ni devis renkonti Anik dum nur 2 horoj. Ŝi atendis nin. Ŝi prezentis al ni sian edzon kiu tre rapide foriris en la ĝardenon ĉar li ne praktikas Esperanton. Ŝi ankaŭ invitis amikinojn kiu ne multe parolis Esperanton sed kiu tre bone komprenis ĝin. La renkonto estis simpla, kaj simpatia. Ni spektis la videobandon kaj la diapozitivon manĝante kukojn, trinkante teon kaj babilante pri niaj familioj kaj profesioj (Anik kaj ŝia amikino estas emeritinoj. Anik laboris en socialaj agadoj kaj ŝia amikino estis kuracistino).

Post fotado, Anik akompanis nin ĝis la loĝaŭto por viziti ĝin. Ni adiaŭis unu la alian kaj instaligis en tendejo.



Bernadette, Anik kaj ŝia amikino, Maryse kaj Daniel

Merkredo la 1an de Junio

Plezura tago: kampado en agrabla ejo, promenado laŭ la kanaloj, gapvagono en piedirantaj stratoj, aĉeto de Delf-fajencoj, manĝado ĉe kanalo-ponto...



Ni rendezvous en la ĉirkaŭurbo de Roterdamo ĉe Peter. Li loĝas en apartamento. Li multe rakontis pri siaj politikaj promesoj kaj pri sia polanda amatino (ankoraŭ esperanta paro). Kiam li rakontis, li estis serioza, pasia kaj ambaŭ ridema, ŝercema kaj ĝoja.

Je la sesa, post rapida manĝo (oni ne ankoraŭ bone komprenis je kioma horo la nederlandanoj manĝas), Peter kondukis nin per buso kaj per subterfervojo al Roterdamo por renkonti la membrojn de la esperanta klubo. Ni atendis ilin en malgranda ĉambro kie la muroj estis kovritaj per la tutaj afiŝoj de la kongresoj kiuj okazis antaŭ pluraj jaroj. Pri ĉiu afiŝo, Peter memoris iajn anekdotojn speciale pri tiu de Montpeliero. Dum tiu kongreso okazis al li diversajn aventurojn ne tre agrablajn je la epoko sed tre amuzaj kiam nun, li rakontas ilin. Ekzemple, li intermiksas la teleŝaltilon de la televidilo kaj tiun de la klimatizilo. En naĝejo, oni diponigis al li bankostumon, kiu ne konformiĝis al lia staturo: ĝi estis tro malgranda. En Kamargo, li promenis per malstabila biciklo.

Peter estis tre bona rakontisto.

La esperantista grupo alvenis kaj, kiel ĉie, ili tre bone akceptis nin. Kune, ni ekvidis la rezultojn de la eŭropa referendumo. Denove granda surprizo (Ne: 63 %) kaj kompreneble ni longe interparolis

kunvenis kun la grupo de Roterdamo. Vidita de tiu etaĝo la domo ŝajnis al mi pli impona ol mi antaŭe imagis. Ni alvenis frue kaj atendis la aliaj en ĉambro kie aŭŝoj pri la antaŭaj Universalaj Kongresoj estis ekspoziciitaj. Bernadette fotis ilin. Ni kunvenis en alia ĉambro kie estis portretgalerio pri la antaŭaj prezidantoj de UEA. La membroj de la grupo estis 4 el 7. Ili kutime kunvenas kaj unu el ili prelegas pri artikolo aŭ libro kiu plaĉis al li aŭ al ŝi.

Ili estis seniluziigitaj ĉar, S-ro Breems estis dirinte al ni ke ne estas funkcia televidaparato en la Centra Oficejo, do ni ne kunportis kun ni la videobendon pri la pikarda marbordo. Do ili montris al ni videobendon, esperantlingve, pri Montpeliero, kiu ne estas la sama ol tiu de nia grupo. Poste ni rigardis... Unu el al membroj de la grupo de Roterdamo laboris en la Centra Oficejo, kaj tiu ĉi 1a de Junio estis ŝia unua tago de emeritiĝo. Kaj ŝi revenis sur sian laborlokon por ricevi nin. Ŝi estis senpacienca havi la rezultojn de la nederlanda referendumo. Do ni rigardis le televidon, nederlandlingve, kompreneble. Je la ekrano aperis 35, poste 34, poste 33,... ĝis Nee 63 %!!!! Estis momento da silento en aero, kaj mi pensis: kia vangofrapo! Kaj ŝi diris: «kia vangofrapo!». Poste mi ne plu povis priskribi la etoson, aŭ nur por diri ke estis ĥoro da voĉoj kaj vigla ĝenerala babilado. Antaŭ la vojaĝo kelkaj estis dirintaj al mi ke la nederlandoj voĉdonos nee ĉar la konstitucio ne estas sufiĉe liberema. Ne estas tio kiu manifestiĝis de niaj konversacioj pri tiu temo. Male, la kialoj ŝajnis al mi pli proksimaj ol la niaj kiel, la alteco de la prezoj, la timo pri la estonto de la sociala sekureco kaj pri la nerespekto de la popoloj. Ili diris ke oni ĝis nun neniam demandis ilin pri siaj opinioj pri Eŭropo, kun nuanco de amareco. Mi pensis: la malalta Eŭropo ĵus eldiris «fekaĵo» al la elita Eŭropo! Mi devas aldoni, ke mi estis surprizita pri la fasado de la Centra Oficejo. En la jarlibro aŭ en la revuo Esperanto oni ĉiam reprezentis ĝin per desegno kiu montras maljuna domo. Fakte la fasado de la Centra Oficejo aperis al mi kiel tute moderna kaj bonstata konstruaĵo. Ni revenis ĉe S-ro Breemson per subtera fervojo kaj aŭtobuso, kaj tendumis triope en lia salono.

La morgaŭo ni matenmanĝis kun li metante niajn proviantojn komune. Ni multe bedaŭris esti devigontaj esti en Antverpeno komence de la posttagmezo, ĉar S-ro Breems estus ŝatinta gardi nin dum 2 aŭ 3 tri tagoj por ĉiĉeroni nin en Delft, en Den Haag! Ve, ni devis foriri!

Ĵaŭdo la 2an de Junio: Antverpeno la Reĝina.

La *Ring* de Antverpeno estis dum renoviĝanto. Kia ĥaoso! La trafiko antaŭeniras nur paŝoalpaŝe. Ne plu estis ŝildojn por indiki la vojojn. Oni tute ne sciis kiel eliri la *Ring-on*. Oni preskaŭ faris tutan rondiron ĉirkaŭ Antverpeno. Fine ni sukcesis eliri, ie ajn, en la ĉirkaŭurbo!! Ni sukcesis trovi, kie ni estis kaj devis reveni malantaŭen, ĉiam tiel rapide!! Ni eniris ie ajn en la urbon kaj post multaj petoj fine alvenis al la stacidomo *Berchem* kie estis nia rendevuo kun pli ol unu horo da malfruo!!

Neniu, kompreneble. Ni devis aĉeti telefon-karton, trovi la jarlibron, do la telefon-numeron kaj alvoki iun. Nia korespondantino atendis nin trankvile apud la telefono. Dek minutoj poste ŝi retrovis nin bicikle. Ni rapide malsuprenirigis la biciklojn (ĉar ŝi mem rendevuas kun la Prezidanto de FEL por ĉiĉeroni nin) kaj sekvis ŝin tra la urbo.

«Pri la adresoj de niaj korespondantoj: estis la malfacilaĵego por finfine trovi la bonan vojon kaj la bonan adreson. Tio nervozigis min.»

pri tio.

Dum la vespero, ni reiris ĉe Peter-hejmon. Li ne volis, ke ni dormu en la loĝaŭto. Li opiniis, ke la kvartalo ne estas sufiĉe senriska. Do, ni prenis niajn kusenegojn, instaliĝis ĉe lin en ĉambron en lia apartamento.



Tiom da afiŝoj, kiom da Universalaj Kongresoj de Esperanto

Ĵaŭdo la 2an de Junio

Morgaŭ matene post matenmanĝo, ni rependigis la biciklojn sur la logaŭton (dum la nokto, ili estis en la kelo ĉar Peter temis ke iu ŝtelus ilin). Kaj estis la momento adiaŭi lin. Peter volis gardi nin sed bedaŭrinde ne eblis ĉar alia rendevuo en Belgio ne permesus al ni halti ĉi tie pli longe.

Ni foriris al Antverpeno. Ni devis trovi Agnes ĉe stacio. La trafiko estis tre grava sur la preterveturejo ĉirkaŭ la urbo (*Ring*). Ni multe turniĝis antaŭ trovi la rendevulokon kie estis multe da stratlaboroj kaj estis tre malfacile starigi la logaŭton.

Fine ni sukcesis. Ni metis ĉe dorso niajn esperantajn ĉemizojn sed neniu alproksimiĝis. Ni aĉetis belgan telefonkarton kaj kontaktis Agnes kiu atendis nian alvokon. Ŝi alvenis per sia biciklo. Kune ni iris ĝis la loĝaŭto, prenis niajn biciklojn kaj sekvis Agnes ĝis la centro de Esperantisto kie la prezidanto atendis nin. Antverpeno estas la plej granda centro de

Komence oni regalis nin per trinkaĵoj. Poste oni vizitis la Flandran Esperantisto-Ligon. Estas je la subtera etaĝo kaj la teretaĝo kie oni eldonas **Monaton**, plurajn revuojn kaj multajn kaj multajn esperantajn librojn. Ni vidis la tutan fabrikĉenon ĝis la vendejo kaj ekspedejo. Nekredeble! Ni estis en unu el la sanktejoj de Esperantujo!!! Kia emocio! Por ekvilibri la kontoj nkaj viviĝi 5 oficistoj, ĉi tie, oni ankoraŭ presas neesperantistajn aferojn. La konstruaĵo estis aĉetita de la institucio Hodler. La luprezo devis esti sen problemo kaj la grupo de Antverpeno, kun multaj volontuloj renovigis la domon. Sed la ĝiradoj estis ege malfacilaj. Fine la grupo obtenis la rajton pagi malaltan luprezon, sed devas prizorgi pri la bonstato de la domo. Je la unua etaĝo estas la kunvensalonoj de la grupo kun startablo. Oni ne vizitis la duan etaĝon kie estas nur komputiloj.

Poste, la prezidanto kaj nia korespondantino bicikle ĉiĉeronis nin tra la maljuna Antverpeno. Oni klarigis kiel la unuaj homoj instaligis sur la dekstra flanko de la rivero Schele kaj kiel la urbo disvolvigis per sinsekve samcentraj cirkloj. Kiel en Amiens unu el tiuj circoj estas konstituita el bulvaroj estinte anstataŭintaj malnovajn remparojn. Dum longtempe, ne estis konstruaĵoj sur la maldekstra flanko de la rivero. Kaj la stilo de tiu kvartalo estas tre malsimila al la malnova urbo, kompreneble. Neniu ponto permesas transiri la riveron. Ĝi estas 500 metroj larĝa! Nur estas tri tuneloj : unu por aŭtoj, unu par trajnoj kaj unu por biciklantoj kaj piedirantoj. Ni uzis tiun ĉi tunelon por havi belan vidon pri la urbo. Kia surprizo! Oni eniras en ĝin per liftoj kiuj kondukas nin ĝis 32 metroj sube!! La centro de Antverpeno estas ege ĉarma. Mi ne scias kiel priskribi ĝin tie ĉi. Regas agrabla etoso en medio tamen tute urba. Ĉu estis la harmonio de la konstruajaro kiu influis min aŭ la rimarkindecoj de niaj gvidantoj : ili parolas en mirinde flua Esperanto per klaraj kaj dolĉaj voĉoj, kiujn oni komprenas same kiel la francan rekte sen devi traduki, ŝi estis tre atentema, kompletigis liajn diraĵojn per pluaj detaloj kaj anticipis por ke li nenion forgesu. Ĉu vi volas scii la kialon pro kio la urbo nomiĝas Antverpeno? Grandegulo regis momente la urbon. Li petis de la kapitano de ĉiu ŝipo, kiu veturas sur la rivero impostojn. Kompreneble kelkaj provis pasi senpage. La grandegulo kaptis ilin tranĉis al ili la manon kaj jetis ĝin. *Ant* signifas *mano*, *pen* signifas *jeti* kaj *Antverpeno* *mano jetita*. Tamen mi bone esperas reiri en ĉi tiun urbon.

Ne estas vojaĝo sen incidento. Estante sur la maldekstra bordo de la rivero, mi rompis la biciklĉenon. Tio ne estis tro grava, sed antaŭtempe maldaŭrigis la viziton kaj okazigis malagrablaĵojn al nia korespondantino.

Fine ni rekondukis ŝin ĉe ŝin kaj ŝi bone indikis al ni kiel eliri el Antverpeno. Ni trovis malbelan lokon por tranokti en vilaĝo apud la aŭtovojo.



En Nederlando ankaŭ preĝejoj belegas...

esperantista eldonaĵo. Preskaŭ ĉiuj esperantistaj publikaĵoj, speciale la fama revuo **Monato** estas presataj tie ĉi en tiuj ĉi lokoj, kiujn oni detale vizitis.

Poste, li montris al ni mapon de la urbo por bone klarigi al ni kiel la urbo kreskis dum antaŭaj jarcentoj.

Kune, biciklante, ni atingis la urbocentron por viziti ĝin. Pri ĉiu statuo aŭ monumento, li rakontis interesajn anekdotojn kaj legendojn. Poste, li devis foriri kaj ni daŭrigis la viziton kun Agnes.

Anekdotoj pri la urbo kun Bernadette



Kelkaj vidpunktoj de nia vojaĝo tra Nederlando...



La vetero estis bela, la promenado tra la urbo tre agrabla sed bedaŭrinde, la ĉeno de la biciklo de Daniel rompiĝis.

Ni ne havis materialon por repari kaj la loĝaŭto estis je 5 kilometroj. Oni pensis, oni interopiniis kaj oni decidis : Daniel kun Maryse restos ĉi tie ĉe teraso de trinkejo dum Agnes kaj mi iros por elparkumi la loĝaŭton.

Kun la telefonnumero de la trinkejo en poŝo por kontakti ilin se bezonus, Agnes kaj mi trairis la urbon ĝis la loĝaŭto, haltante nur malgrandan momenton ĉe ŝia filo por saluti lin kaj trinki ion. Senprobleme ni retrovis la loĝaŭton sed la biciklo de Agnes, estante elektra, estis tro peza kaj ne ebligis sukcese pendigi ĝin sur loĝaŭton.

Antaŭ retrovi Daniel kaj Maryse, ni devis iri ĉe Agnes demeti ŝian biciklon. Sed, en Antverpeno, per loĝaŭto ne estas facila afero sekvi biciklon, ĉar la vojoj por la veturiloj kaj la vojoj por la bicikloj ne estas la samaj.

Do, Agnes regule donis al mi rendevuon apud semaforo kaj de semaforo ĝis semaforo, ni alvenis ĉe ŝian domon, kie ŝi lasis sian biciklon. Tiel, ni povis retrairi la urbon ĝis la trinkejo. Daniel kaj Maryse estis atenditaj nin dum preskaŭ 2 horoj. Ili komencis sindemandi, kio okazis.

Ni kroĉis la biciklojn kaj, kune, denove, oni retrairis la urbon en alia senso por rekonduki Agnes hejmen.

**«Do, mia sento pri
Nederlando estas la ĉarmo,
ke la lando per kvieteco,
verdaĵo, kaj la tero, la akvo,
la ĉielo intermiksiĝis.»**

Maryse

Estis la plej lasta tago de nia vojaĝo; morgaŭ ni devus esti ĉe ni en Amieno. Agnes telefonis al sia filo por ke li indiku al ni la plej bonan vojon al Bruselo sen havi la trafikproblemojn sur la *Ring* kiel matene. Ankoraŭ dankon al Agnes kiu tiel bone prizorgis nin.

Eliri Antverpenon estis pli facile ol eniri ĝin. Sed, estis la 22a horo. Ni forlasis aŭtovojon, haltis en malgranda vilaĝo, ni manĝis, ni

dormis kaj ni matenmanĝis.

Direkto Amieno! La vojaĝo estis finiĝinta. Bona esperantista sperto! Belaj renkontoj! Dankon al ĉiuj.

Daniel

Bernadette

Vendredo la 3an de Junio


Reiro. Nenio por diri pri tiu rehejma vojaĝo.

Aliaj bildoj pri nia vojaĝo tra Belgio kaj Nederlando


Nederlando:
ebena lando de akvo



Nederlando:
riĉa lando de kulturo



Maryse kaj Daniel kompreneble
fotitaj de Bernadette ;-)



Maryse kaj Daniel laborantaj
por nutri tiun ĉi vojaĝ-libreton

